WIKIPEDIA

Zelanda lingvo

Zelanda lingvo (*Zeêuws* en la zelanda, *Zeeuws* en la nederlanda) estas regiona lingvo, ĉefe uzata en nederlandaj provincoj Zelando kaj Suda Holando, kaj ankaŭ sur insulo Goeree-Overflakkee. Kvankam ofte oni rigardas la zelandan kiel dialekton de nederlanda lingvo, ĝi havas sufiĉe grandajn diferencojn de la nederlanda kaj je prononco, kaj je gramatiko kaj vortaro. Plej kutime, denaskaj parolantoj de la nederlanda ne komprenas la zelandan sen speciala preparo. Kelkaj lingvistoj opinias, ke la zelanda estas dialekto de la okcidentflandra lingvo[1]

ISO-lingvokodo :

639-1 =	mankas
639-3 =	**zea**

Enhavo

Deveno

Gramatikaj ecoj

Dialektoj

Geografia distribuo kaj sociaj ecoj

Notoj kaj referencoj

Eksteraj ligiloj

Deveno

Historie la zelanda estas intermedia lingvo inter la holanda kaj okcidentflandra. Dum la Mezepoko ĝi estis uzata en ambaŭ Holando kaj Flandrio, kaj do havas influojn de ambaŭ direktoj. Dialektoj de la zelanda montras pli da holandajn elementojn en la norda parto de la regiono. Tamen, entute la lingvo estas sufiĉe konsista kaj la limoj de ĝia areo estas tre facile difineblaj, ĉar longaj marbordoj formigas fortajn isoglosojn.

Gramatikaj ecoj

La plej grandaj diferencoj inter zelanda lingvo kaj la akademie standarda nederlanda estas jenaj: la zelanda konservas tri gramatikaj genroj anstataŭ du en standarda nederlanda; konsekvence, la zelanda konservas finajn ŝvaojn en inaj vortoj; ĝi ankaŭ konservas monoftongajn [i] kaj [y] por *ij* kaj *ui*, anstataŭ diftongaj [ɛi] kaj [œy]; en plimulto de vortoj de la zelanda, [aː] transformiĝis al [ɛː]; malnovĝermanaj diftongoj [ai] kaj [au] transformiĝis al ([eə] kaj [ɔə]) en la zelanda, kiam en standarda nederlanda ili kunmiksiĝis kun [e] kaj [o]; krome, la *h*-litero preskaŭ tute malaperis el la zelanda.

La sekva tabulo ilustras la prononcajn diferencojn inter la zelanda kaj la holanda (per nederlanda ortografio):

Zelanda	Holanda	Esperanto
d'n boer	de boer	la kamparano
de boerinn**e**	de boerin	la kamparanino

uus	huis	domo
k**ie**ke(n)	kijken	rigardi
tw**eê**	twee	du
oôd	hoofd	kapo

Dialektoj

La provinco de Zelando konsistas je kelkaj artifarite konetitaj insuloj, kiuj estis sufiĉe izolitaj ĝis mezo de 20-a jarcento. Rezulte, preskaŭ ĉiu tiu insulo havas klare distingan dilekton, kaj la diferencoj, kvankam negrandaj, estas rimarkeblaj. Ekzemple, dialekto de Goeree-Overflakkee, konservas la *h*-sonon, kaj dialektoj de Walcheren kaj Zuid-Beveland havas umlaŭtojn tie, kie pli nordaj dialektoj ne havas (ekzemple, *beuter* [bøtər] anstataŭ *boter* [botər]). Ekzistas eĉ kelkaj etaj diferencoj inter komunumoj ene de unu insulo: ofte lokaj loĝantoj povas diveni el kiu vilaĝo venas la persono laŭ la prononco de tiu persono, eĉ se por fremduloj tiuj diferencoj estas nesenteblaj.

La dialektoj de Zeeuws Vlaanderen estas plejparte nekongruaj kun difino de la zelanda lingvo. Oni konsideru ilin dialektoj de aŭ okcidentflandra lingvo aŭ de la orientflandra. Tamen oni ofte titolas okcidentflandrajn dialektojn de la regiono "zelandaj".

Geografia distribuo kaj sociaj ecoj

En komuna pensmaniero zelanda lingvo estas forte konektita kun kamparanoj, ĉar plimulto de parolantoj estas farmistoj kaj vilaĝanoj. Urbaj dialektoj de Middelburg kaj Vlissingen estas multe pli proksimaj al la holanda kaj preskaŭ formortis. Enketoj de 1990-aj jaroj montris, ke ĉirkaŭ 60% de la loĝantaro de Zelando ankoraŭ uzas la zelandan kiel ĉiutagan lingvon. Oni ekspektas, ke estas ĉirkaŭ 250000 denaskaj parolantoj (tio inkluzivas flandrajn dialektojn de okcidenta Zelando). Kvankam, kiel ofte okazas ĉe regionaj lingvoj, la nombro de parolantoj malkreskas, danĝero de formorto estas negranda, ĉar en multaj izolitaj komunumoj pli ol 90% de junuloj parolas la zelandan. En aliaj vilaĝoj, tamen, aparte en tiuj kiuj suferas fortan enmigradon, la zelanda lingvo estas uzata preskaŭ ekskluzive de plenkreskuloj, ĉar oni ne speciale instruas ĝin al la infanoj.

Ekzistas lobia movado por agnosko de la zelanda kiel Eŭropa minoritata lingvo. En 2005 ĝi ankoraŭ ne havis tiun statuson.

Notoj kaj referencoj

1. ↑ Marco EvenhuisZeelandic (http://taal.phileon.nl/eng/zeelandic.php). *Language in the Netherlands*. Streektaal.net. Alirita 2007-06-03. “Together with West-Flemish and the Flemish spoken in northern France, Zeeuws is part of a cluster of remarkably homogenic dialects.”. Dutch versions: Zeeuws (http://taal.phileon.nl/zeeuws.php) or as pdf (http://taal.phileon.nl/pdf/zeeuws.pdf)

Eksteraj ligiloj

- Ethnologue report for Zeeuws (http://www.ethnologue.com/show_language.asp?code=zea)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Zelanda_lingvo&oldid=6020784"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 17:44, 11 sep. 2016.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.